

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo**

## **ĵaŭde la 2-an de decembro 2019 per Skype.**

(Protokolo aprobita pere de retmesaĝoj)

### **Partoprenis:**

Amelie Matt en Tromsø  
Lars Sandbakk en Sandnes  
Mario Machlik en Tromsø  
Bård Hekland en Bergen

### **0. Tagordo**

Aprobita.

### **1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 7-an de novembro**

Aprobita.

### **2. Registro de subskribrajtoj ĉe Brønnøysundregistrene,**

#### ***Registrere signaturrett ved Brønnøysundregistrene***

*Styret vil registrere signaturrett for de følgende styremedlemmer, hver for seg:*

*Mario Machlik, Barduveien 3, 9012 Tromsø*

*Jardar Eggesbø Abrahamsen, Asbjørn Øverås veg 14 G, 7036 Trondheim*

*Claude Rouget, Rypeveien 68, 9015 Tromsø*

### **3. Fermo de la bankkonto por E-nytt**

La estraro decidis fermi la konton 7877 06 79590 ĉe DNB. Tiu konto antaŭe estis uzata por *Esperanto-Nytt*. Nun ni havas novaĵleteron kiun ni dissendas per la interreto kaj ĝi estas senpaga por la publiko.

### **4. Subteno al lokaj kluboj kaj al NJE**

Ni konsentis pri tio, ke la malaktivaj kluboj (tiuj, kiuj ne sendas jarraporton al la estraro) ne rajtos ricevi subtenon. La aktivaj kluboj ricevos subtenon laŭ la samaj kondiĉoj kiel antaŭe, sed nur pro tiuj membroj, kiuj jam pagis siajn kotizojn al NEL ĝis la 31a de oktobro de la koncerna jaro.

### **5. Malaperigo de la kaso**

Certe plifaciligos la laboron de la kasisto kaj simpligas la jarkalkulon, se la kaso (kaj per ĝi la etaj sumoj) malaperos. La estraro apogas ke malpli da kontanta mono estu uzata. Pri la detaloj ni devas komenci la diskuton kun la deĵoranto de la oficejo. Por la jarkalkulo de 2018 kaj 2019 dume la enhavo de la kaso aperu kiel diversaj elspezoj.

### **6. Partopreno de Osloa klubo al kostoj de oficejo**

Pri tiu punkto ni devas komenci dialogon kun la klubo. Se la klubo trovos tion akceptebla, ke ilia parto pri la elspezoj estu fiksita (kaj tiel pli bone planebla), tiam NEL povas havi tian aranĝon sciante, ke eblaj eksterordinaraj kostoj ŝarĝos la ekonomion de NEL.

### **7. Neniu rento por dormantaj kluboj**

Kongrue al punkto 4a, malaktivaj kluboj rajtas havi sian monon ĉe NEL, sed ili ricevos nek subtenon, nek renton.

### **8. Nuligo de malnovaj ŝuldoj kaj malŝuldoj**

La estraro komisias al la kasisto saldi ankoraŭ ne solvitajn ŝuldojn/malŝuldojn de 2017 kaj antaŭaj jaroj en la ellaborotaj jarkalkuloj de 2019.

### **9. Uzado de avtalegiro kaj E-faktura**

La estraro komisias al la kasisto eventualan uzadon de Avtalegiro kaj eFaktura kiam tio estas oportuna por NEL.

### **10. Retadreso por la kasisto**

Jardar starigis konton por la kasisto. Adreso: kasisto(ĉe)esperanto(punkto)no . Pasvorton ricevos Claude kaj Douglas.

### **11. Eventualaĵoj**

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 20:30 - 21:30

La venonta interkonsiliĝo okazos la 9-an de januaro 2020 je la 20.30.

Raportis Mario Machlik